


## Pfänder –
## La monto ĉe la Konstanca Lago

La monto *Pfänder* [pfenda] (1064м) kun sia senkompara vido al la Konstanca Lago, Germanio, Aŭstrio kaj 240 alpaj montopintoj sendube estas la plej fama belvidejo de la regiono.

Du panoramaj observejoj provizas informojn pri la regionoj ĉirkaŭ la lago kaj pri la alpaj montoj.

Egale ĉu vi promenas piede aŭ bicikle, vizitas la alpan bestoparkon aŭ simple admiras la panoramon ekde la restoracia teraso – tago pasigita sur Pfänder restos neforgesebla sperto.

## La alpa bestoparko Pfänder

Allogaĵo por la tuta familio: En la ampleksa parko, situanta ĉe la supra stacio de la telfero, admireblas grandiozaj specimenoj de sovaĝaj bestoj de la regiono. Venu kaj observu ilian konduton en ilia natura vivejo. Eniro senpaga.

Laŭ itinero ĉirkaŭ-30-minuta, signoj kaj afiŝoj informas pri la faŭno kaj la flaŭro; krome eblas observi ibeksojn, cervojn, aprojn, muflonojn kaj marmotojn.

Speciale ŝatataj de infanoj estas la tenejoj kun nanaj kaproj, kunikloj kaj pendventraj porkoj. La parkon apudas granda ludejo kun la plej longa senakva glitejo de Vorarlbergo, korbo-balancilo, oscilantaj rajdfiguroj kaj grimpejoj.

## La restoracio Berghaus Pfänder

Dum la somera sezono de 2026-05-07 al 09-24 ĉiutage malferma de la 9:30 al la 18:30.

La kamparstila memserva restoracio ofertas panoraman terason, de kiu admireblas la trilanda regiono kaj la Konstanca Lago, 63 km longa, 14 km larĝa kaj 252 metrojn profunda.

La tutan tagon eblas ĝui elektitajn menuojn, malvarmajn manĝaĵojn, dolĉaĵojn kaj tortojn el propra produktado, krome regionajn specialaĵojn.

Por vojaĝgrupoj, firmaoj kaj asocioj disponeblas kelnerserva restoracio en la supra etaĝo; necesas antaŭmendi. Demandu nin pri menuaj proponoj. Por grupoj ekde tridek personoj la restoracio estas malferma ankaŭ vespere.

**Berghaus Pfänder**, familio Dobler, 6911 Lochau, Aŭstrio
Tel.: +43(0)5574-42184-0, faks.: +43(0)5574-42184-5

En la vintraj monatoj la aŭtentika alpa restoracio „Pfänderdohle“ (Pfänder-monedo), ok piedirajn minutojn de la supra telfera stacio, estas malferma de 9:30 ĝis 18:30.

**Gastejo Pfänderdohle**, 6911 Lochau, Aŭstrio
Tel./faks.: +43(0)5574-43073

## La telfero Pfänderbahn

**Horaro**
➜ Ĉiutage inter 8:00 kaj 19:00 (laŭ antaŭmendo ĝis 23.00, demandu pri la prezo).
➜ Veturado ĉiun duonan horon, ekde 10 personoj ĉiujn 15 minutojn.
➜ Transporto de bicikloj tuttage (inter 8:00 kaj 10:00 senkoste).
➜ Fermite pro revizio de la 11-a de januaro ĝis la 19-a de februaro 2027.

La telfero Pfänderbahn estas cent-elcente alirebla por personoj kun movaj handikapoj; ĝi ricevis la titolon „Elstara somera telfero“ de la asocio de aŭstriaj telferoj. Jen pruvilo pri la alta kvalito de niaj servoj.

**T Tarifo 2026/27**

| | | |
|---|---|---|
| Plenkreskuloj | Supren kaj malsupren | € 19,00 |
| | Supren aŭ malsupren | € 12,70 |
| Aĝuloj ekde 65 jaroj | Supren kaj malsupren | € 18,00 |
| | Supren aŭ malsupren | € 12,00 |
| Junuloj (16 – 19 jaroj) | Supren kaj malsupren | € 16,30 |
| | Supren aŭ malsupren | € 10,30 |
| Infanoj (6 – 15 jaroj) | Supren kaj malsupren | € 9,50 |
| | Supren aŭ malsupren | € 6,30 |
| Infanoj malpli-ol-6-jaraj akompanataj de plenkreskulo: senpagaj | | |
| Invalidoj ekde 70 % | Supren kaj malsupren | € 18,00 |
| | Supren aŭ malsupren | € 12,00 |
| Turismaj grupoj ekde 15 plenkreskuloj | Supren kaj malsupren | € 15,20 |
| | Supren aŭ malsupren | € 10,20 |
| Familia bileto – gepatroj kaj ĉiuj iliaj propraj infanoj ĝis aĝo de 19 jaroj | Supren kaj malsupren | € 38,00 |
| | Supren aŭ malsupren | € 25,40 |

☺ La telfero Pfänderbahn estas inkluzivita en la Distrobileto Konstanca Lago (Bodensee-Erlebniskarte).
☺ Sur liniaj ŝipoj irantaj al Bregenco eblas aĉeti rabatitajn biletojn por Pfänderbahn.

**Pfänderbahn AG**, Steinbruchgasse 4, 6900 Bregenz, Aŭstrio
Telefono: +43(0)5574-42160-0, office@pfaenderbahn.at

## www.pfaenderbahn.at